

## & Diru ĉiam la veron!:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 1295 paŝoj dum 15 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per sama melodio kiel por Konfeso kaj simila rekantaĵo. Klarigo (\*): '24 Monaĥo ne rajtas havi edzinon.>

### (#Melodio:

<1,5:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LalSo

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×35 )+

### (&Strofoj:

'1 /Diru ĉiam vi la veron ; Plenkuraĝe, sen hezit' ; Per mensogo la aferon ; Vi nur fuŝas, ho homi2d'!

(×: **Zorge li portas juvelon ; Kaŝe vortas li la celon ; Ne mensogas tamen li ; Zorge li portas juvelon.**)

'2 Se la veron vi sciigas, ; Vin subtenas Dia man', ; Se mensogon vi aplikas, ; Vin englutas la satan'. .....

'3 Iam fama kapuceno, ; Elokventa predikanto, ; veturadis al Aĥeno ; Hejmen el la belga lando. ....

'4 En kupe' li sidis sole ; Nur kun juna sinjorin'; Li meditis senparole ; Kaj do ne atentis ŝin. ....

'5 Estis homo li tre sprita, ; Bonhumoron ŝatis li; Ofte jam torento rida ; Sekvis al parol' de li. ....

'6 Nun en la kupe' li sidis ; Jam dum pli ol unu hor', ; Pri prediko li meditis ; Silentante kun fervor'. ....

'7 Sed ekvidis li subite, ; Ke la juna sinjorin' ; Ja spiregis ekscitite ; Kaj tremetis eĉ sen fin'. ....

'8 La manpoŝon ŝi malfermis, ; Enrigardis kun ekscit' ; Kaj rapide ĝin refermis, ; Kvazaŭ estus li bandit'. ....

'9 "Estimata sinjorino", ; fine li demandis ŝin, ; "Kial tremas vi sen fino, ; Kio do ekscitas vin?" .....

'10 "Pastra moŝto, min la timo ; Skuas jam dum tuta hor'; Pro l' kontrolo ĉe la limo ; Forte tremas mia kor'. ....

'11 Mi nun venas el Bruselo. ; Mia kara bopatrin' ; Min ornamis per juvelo, ; Kiam mi vizitis ŝin. ....

'12 Estas ora ĝi kolĉeno ; Kun belega diamant'; Sed mi loĝas en Aĥeno, ; Do en la germana land'. ....

'13 Kaj la sorto senkompata ; Lasas ne ĝin porti for. ; Malpermesas leĝo ŝtata ; La eksporton nun de or'. ....

'14 Do kunprenis senpermeso ; Mi en la manpoŝo ĝin. ; Sed nun timas mi senĉese, ; Ke l' dogan' konfiskos ĝin. ....

'15 Centmil frankojn ĝi valoras; Estas ĝi por mi trezor', ; Sed se senkorul' deĵoras, ; Li ĝin certe prenos for. ....

'16 Kun bedaŭra gest' respondis ; La monaĥo nun al ŝi: ; "Kial ne antaŭe sondis ; Ĉiujn cirkonstancojn vi? .....

'17 Oni fakte ja kutimas ; Preni juvelaĵojn for, ; Kaj do ankaŭ mi nun timas, ; Ke seniĝos vi de l' or'. ....

'18 Lastan ruzon mi proponas, ; Se vi volas uzi ĝin: ; Ĉiuj doganistoj konas ; Jam de longa tempo min. ....

'19 Do mi provos la aferon, ; Donu do la poŝon vi! ; Sed mi diros nur la veron, ; Nepre ne mensogos mi." ....

'20 Al la pastro do transdonis ; Sian poŝon la virin'. ; Sammomente jam deponis ; Li en la kapuĉo ĝin. – ....

'21 Jen la vagonaro haltis ; En stacio ĉe la lim'; Ili ambaŭ teren saltis, ; Li ridante, ŝi kun tim'. ....

'22 Kiam la monaĥo iris ; Al la ejo de l' dogan', ; Oficist' ridante diris: ; "Jen la pastro Koloman"! ....

'23 Ĉu kunprenis valoraĵojn ; Trans la limon ankaŭ vi, ; Ĉar direktas viajn paŝojn ; Vi nun rekte ja al ni?" ....

'24 Kaj la pastro kun sinklino ; Diris sen hezit' al li: ; "La kolĉenon de l' edzino\* ; En kapuĉ' kunportas mi." ....

'25 La sinjoroj laŭte ridis ; Pro la vere stranga dir': ; "Pastra moŝto, ni jam vidis, ; Ke vi estas sprita vir!" ....

'26 Sed la poŝon eĉ elprenis ; Nun la pastro Koloman', ; Kaj montrante li ĝin tenis ; Per levita dekstra man': ....

'27 "Ĉiu, kiu nun deĵoras, ; Venu do por vidi ĝin! ; Centmil frankojn ĝi valoras, ; Kaj mi ne mensogas vin." ....

'28 Sed la viroj ridis plore ; Pro gajeco kaj plezur': ; "Ho, ni dankas vin elkore, ; Vi ja certe ŝercas nur!" ....

'29 "Sed rigardu do ĝin fine! ; Ne mensogas Koloman'!" ; Kaj la poŝon li obstine ; Eĉ malfermis per la man'. ....

'30 "Pastra moŝto, ni komprenas, ; Vi nur volas moki nin, ; Kvankam sed vi tiom penas, ; Tamen ni ne kredas vin!" ....

'31 "Ĉu do fakte mi foriru, ; Sen ke vi rigardis ĝin? ; Sed vi ne estonte diru, ; Ke la pastro trompis vin!" ....

'32 Kaj dum la sinjoroj ridis, ; Tuj la pastro Koloman' ; trans la limon forrapidis ; Kun la poŝo en la man'. ....

'33 Kaj la poŝon li redonis ; Al feliĉa la virin', ; Sed li ankaŭ ŝin admonis ; Dum li adiaŭis ŝin: ....

'34 "Diru ĉiam vi la veron, ; Plenkuraĝe sen hezit'! ; Per mensogo la aferon ; Vi nur fuŝas, ho homid'. ....

'35 Se la veron vi sciigas, ; Vin subtenas Dia man', ; Se mensogon vi aplikas, ; Vin englutos la Satan'." ....)